



Boletín

n° 422 Aprilo - Junio 2018



Asociación de utilidad pública

Boletín

Bulteno de Hispana Esperanto-Federacio
aperanta de 1949
Numero 422

Redakto-skipo
Direktado kaj kompostado: Ángel Arquillos L.

Revizio: Alejandro Pareja / J. A. del Barrio

Retadreso de la bulteno:
bulteno@esperanto.es

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la respektivaj aŭtoroj

* La redakcio rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn

*Republikado de enhavo nur permesita kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro

Financaj aferoj: financoj@esperanto.es

Aliaj aferoj (escepte de financaj):
admin@esperanto.es

Hispana Esperanto-Federacio *Federación Española de Esperanto*

Rodríguez San Pedro, 13, 3º, 7

ES-28015 Madrid

admin@esperanto.es

Bankokonto BBVA: ES85 0182 1252 31
0204011961

TRIODOS BANK: ES24 1491 0001 2420 0926
4025

Poŝtelefono: +34 638 547 104

Telefono: +34 914 468 079 (bv. lasi mesaĝon
en la aŭtomata respondilo)

Estraro

Prezidanto: José Antonio del Barrio

Vicprezidanto: Ángel Arquillos López

Sekretario: Águeda Biurrun

Kasisto. Jesús M. García Iturrioz

Voĉdonantoj: Eduardo Berdor
Raúl Martínez
Alejandro Escobedo (prezidanto
de HEJS)

Presejo: Gráficas Notivol (Zaragoza)
DL: M-39811-2012 / ISSN 2444-8400

Salutvortoj

Tri eventojn samtempe organizas Hispanio okaze de la UK en Lisbono, tio estas ja grava laboro, kaj laŭ la programo kaj la nombro da aliĝintoj, oni atendas historian sukceson, tamen neniam estas tro, ĉar la afero estas tre interesa kaj la profito alloga por ĉiuj gejunuloj (IJK), hispanoj (HEK) kaj ĉiuj interesitoj pri instruado (ILEI), ĉio organizata kaj aranĝita de hispanoj kun partopreno de eksterlandanoj; resume, la granda festo de Esperanto okazos ĉi-jare kunlabore kun Portugalio kie jam aliĝis 1490 homoj el 75 landoj.

Tamen mi rekomendas vin, legantoj de Boletín, ĝui la nunan numeron, kiu estas varia kaj riĉenhava, ĉar ne mankas informo pri la esperanta mondo: Literaturo, Poezio, raportoj, novaĵoj pri diversaj kongresoj, ankaŭ longa listo de libroj alvenintaj al la biblioteko, interalie.

Kiel kutime mi rimarkas ke multaj el la kunlaborantoj sendas nenion, ĉu vi ne havas tempon verki ion pri viaj grupoj, asocioj, ktp? Sufiĉas kelkaj frazoj, kiuj estos bonvenaj, ĉar Boletín estas informilo de la Federacio, kaj la enhavo temas pri Esperantio, t.e. pri ni ĉiuj. Mi certas ke ĉeestontoj al venontaj kongresoj kapablos raporti pri sperto kaj anekdotoj dum la eventoj. Laŭ mi tio estas bona okazo por praktikado de la lingvo, informante samtempe la neĉeestontojn, kiuj certe interesiĝos pri viaj informoj kaj variaj okazaĵoj. Ne hezitu, legu ĉi bultenon kaj poste pripensu la aferon riĉigi ĝian enhavon per viaj kontribuadoj.

Ángel Arquillos
Redaktoro

ENHAVO

Salutvortoj	1
Protokolo Ordinara Ĝenerala Kunveno	3
77-a Hispana Kongreso de E-o kaj 51-a ILEI	5
Asamblea General Extraordinaria de la FEE	7
Kunveno de la Junuala Sekcio/Aliaj kunvokoj	8
Pri Grupoj kaj Asocioj	9
Gabaĉo ĉe Hispana Esperantujo	13
Instruado en la Universitato UNED	14
Estontaj geesperantistoj	15
Esperanto Komunikado	16
Dokumentoj alvenitaj al la Biblioteko 2016-2017	17
Omaĝo al Don Ricardo Cordonú i Stárico	23
Raporto pri la 70-a Kongreso de IFEF	25
Esperanta Poezio malgraŭ pluvo	29
Industrias kaj Andanzas de Alfanhuí (6a ĉapitro)	31



Salou 29. septembro - 6. oktobro

26-a Internacia Semajno de la Kulturo kaj Turismo en Salou, Hispanio. Profitu la okazon ĝui tutan semajnon en luksa hotelo kun tri manĝoj bufedo kaj agrabla etoso interesaj ekskursoj kun internaciaj geesperantistoj el diversaj landoj.

Organizas: Rosa López Martín,
retadreso: rosadelibertad@gmail.com,
marilo1950@hotmail.es

Noto:
Eble estos la lasta Internacia Semajno en Katalunio.

PROTOKOLO ORDINARA ĜENERALA KUNVENO

La 13-an de majo de 2018, je la 11:00 horo (dua alvoko) okazis la Ordinara Ĝenerala Kunveno en la sidejo de Hispana Esperanto-Federacio, strato Rodríguez San Pedro, 13-3º 7. 28015 Madrid.

Ĉeestis la estraranoj: Eduardo Berdor (voĉdonanto), Jesús García Iturrioz (kasisto), Águeda Biurrún (sekretario), Ángel Arquillos (vic-prezidanto) kaj José Antonio del Barrio (Prezidanto), kiu prezidis la kunvenon. Partoprenis ankaŭ 10 individuaj anoj kaj 5 kolektivaj membroj (Frateco el Zaragozo, Andaluza E-Uniĝo, E-Grupo Bilbao, Grupo Liberano Teruel kaj Madrida E-Liceo) reprezentataj de 5 el la ĉeestantaj individuaj membroj.

La sesio disvolviĝis laŭ la jena tagordo:

1.- Legado kaj aprobo de la protokolo de la antaŭa kunveno (24a junio 2017)
Oni aprobis unuanime la protokolon de la antaŭa kunveno aperintan en Boletín n-ro 419.

2.- Aprobo de la kontoj kaj kas-stato de 2017.
Oni aprobis unuanime la kontojn kaj la kas-staton de 2017 aperintajn en Boletín n-ro 421.

3.- Aprobo de la Raporto pri aktivaĵoj de 2017.
La Raporto, prezentita en la Boletín n-ro 421, estis aprobita unuanime.

4.- Informo pri la anaro.

-Individuaj membroj (OM, DM, PM kaj HM):	199
-Kolektivaj membroj (KM):	15
-Entute (individuaj+kolektivaj):	214
-Novaj aliĝoj 2017:	25
-Malaliĝoj 2017:	45

5.-Aprobo de la Buĝeto por 2018.
La buĝeto, aperinta en Boletín n-ro 421, estis aprobita unuanime.

6.- Kotizoj por la jaro 2019.
La prezidanto proponas, ke tiu punkto estu traktita en la Eksterordinara Kunveno, dum la Hispana Kongreso, en julio 2018, por ke pli da anoj povu opinii pri tiu afero. Li sugestas la eblon ke tiuj grupoj kiuj estas tro malgrandaj, ne pagu la kotizon kaze ke almenaŭ du membroj jam pagu individuan kotizon. Ankaŭ oni povos paroli tiam pri la kotizoj de junuloj. La ĉeestantoj aprobas lasi tiun aferon por la Eksterordinara Kunveno.

7.- Informoj pri la Esperanto-Kongresoj en Hispanio en 2018 kaj 2019.

La prezidanto informas pri la kongresoj okazontaj en Hispanio: Hispana, ILEI kaj IJK. La LKK de tiuj kongresoj prilaboras la programon. La financaj aferoj iras bone. Ankaŭ oni informas pri la rezidejo kaj la kunlaboro kun la UNED.

Oni planas fari propagandon dum la venonta monato por altiri junulojn.

La estraro de HEF ĵus aprobis, ke la venonta Hispana Kongreso por la jaro 2019 okazos en Malago (de 1-a ĝis 5-a majo), kunordigata kun la Kongreso de IFEF (de 3-a ĝis 9-a majo).

Ángel Arquillos informas pri tiuj kongresoj, la LKK preparos allogan programon kaj post-kongresan ekskurson al Maroko.

8.- Sugestoj kaj demandoj.

La prezidanto informas pri la Eo-kurso de la UNED: oficiala instruado de Esperanto en la UNED. Nur mankas kelkaj burokrataĵoj, sed jam estas aprobita. La oficiala selektado de la instruisto estos farita de la UNED, sed fakte la kriterioj estos faritaj de HEF. Ni devas pretigi materialon por ne-ĉeesta instruado, organizado de ekzamenoj, ktp. Temas pri la plej grava projekto por la venonta jaro. La skipo pri tiu afero estas Manuel Pancorbo kiel kunordiganto, Eduardo Berdor kiel membro de ILEI kaj Félix Jiménez Lobo kiel sperto en instruado.

Sen pli de aferoj por pritakti, finiĝas la kunveno je la 13,00 horo.

La Prezidanto

La Sekretario

José Antonio del Barrio Unquera

Águeda Biurrun González



77-A HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO, 20-22 JULIO

51-A KONGRESO DE ILEI, 21-28 JULIO Madrido, Hispanio, 2018

LA KULTURA HEREDAĴO DE ESPE- RANTO

DETALE PROGRAMO DE LA 77 HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

Madrida Esperanto-Liceo kaj Hispana Esperanto-Federacio invitas vin partopreni en la 77a Hispana Kongreso de Esperanto, kiu okazos de la 20a ĝis la 22a de junio, en urbo Madrido, kaj en la 51a Kongreso de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj kiu okazos parte koincide, inter la 21a kaj 28a de julio.

Jen la ĉefaj aktivaĵoj antaŭviditaj por la 77a Hispana Kongreso. Atentu: temas pri provizora programo, kaj ĝi povos aktualiĝi antaŭ la komenco de la kongreso. Post la 23-a de julio plu daŭros la ILEI-kongreso, kun aparta programo.

VENDREDO 20 JULIO

Matene, je la 10a horo: Malfermo de la akceptejo en la kongresejo, universitata rezidejo Teresa de Jesús.

Unuaj ekskursoj en Madrido. NOTO: tiuj ekskursoj okazos samtempe kun aliaj programeroj, kaj ripetiĝos en diversaj tagoj, pro necesa limigo de nombro da ekskursantoj.

16,30: Renkonto de lernantoj per la reto kaj unuafojaj partoprenantoj en Esperanto-evento

17,30: Oficiala malfermo de la Hispana Kongreso. Inaŭguro de ekspozicio

18,00: Omaĝo al Esperanto-pioniroj.

18,30: Inaŭgura prelego: Dennis Keefe, "Madrido kaj Movado dum la Movado: Observoj de naiva, novbakita Esperantisto en la Madrida Esperanto-Liceo (MEL) de 1980 ĝis 1988".

19,30: Prelego: Riccardo Lamperti, "... Unamuno estis volapukisto! Unamuno, Salamanko kaj Esperanto"

20,30: Vespermanĝo

22,00: Distra kaj kultura programo. Gufujo kaj kunvenoj.

SABATO 21 JULIO

9,00: Malstreĉiĝo

10,00: Ĝenerala kunveno de HEF

10,00: Alternativa kultura kaj turisma programo por ne membroj de HEF

12,00: Prezento de la Hispana Kongreso 2019 kaj la kongreso de IFEF en Malago

12,00: Kultura kaj turisma programo. Prelegoj kaj atelieroj. Kunvenoj de asocioj

12,00: Malfermo de la libroservo

14,00: Tagmanĝo

Ekde la 15,00: komenco de la kongreso de ILEI, akcepto de nur-ILEI-kongresanoj

15,30: Publika bonveno. Prezento de la Kongreso kaj la urbo Madrido.

16,30: Festprelego: Ana Manero, "Maruja Mallo: multe pli ol avangarda artistino"

16,30: Komenco de kurso de Esperanto por komencantoj kaj de la kurso de la hispana lingvo

17,30: Prezento de nov-eldonitaj libroj: Miguel Fernández, "Ha, Karmela!" kaj "Revene"

17,30: Ateliero de muziko kun Kajto.

18,30: Prezento de nov-eldonitaj libroj: Jorge Camacho, "Palestino strangolata" kaj "Brulvunde"

18,30: Libera prezentado de eventoj kaj asocioj

18,30: Kunveno de la hispana sekcio de ILEI

19,30: Interkona Frandvespero

22,00: Koncerto de Kaj Tiel Plu

DIMANĈO 22 DE JULIO

8,30: Malstreĉiĝo

9,00: Ekskurso al Alcalá de Henares

9,00: ILEI: Komitatkunsido, prelegoj, kursoj

10,00: Alternativaj turismaj vizitoj en Madrido

14,00: Komuna Bankedo

16,30: Lingva Festivalo

20,30: Vespermanĝo

22,00: Aŭkcio. Distraj programeroj. Adiaŭo kaj fermo de la Hispana Kongreso

ASAMBLEA GENERAL EKSTRAORDINARA DE LA FEE

El Presidente les invita a asistir a la Asamblea General Extraordinaria, que tendrá lugar el sábado 21 de julio de 2018, a las 9:30 horas (a las 10:00 en segunda convocatoria) en el Colegio Mayor Teresa de Jesús de Madrid, con el siguiente orden del día:

- 1.- Lectura, comentarios y aprobación del acta de la anterior asamblea (13 de mayo de 2018).
- 2.- Revisión y aprobación de sistema de cuotas para 2019.
- 3.- Renovación parcial de la Junta Directiva, si procede.
- 4.- Proyectos para 2018-2019.
- 5.- Ruegos y preguntas.

IMPORTANTE: Los miembros de la Federación que deseen ser representados por algún otro socio, deben enviar un mensaje indicando claramente el nombre completo del representante y representado, al buzón electrónico admin@esperanto.es, o bien por correo postal a las oficinas de la asociación, antes del 18 de julio.

El Presidente de la Federación Española de Esperanto
José Antonio del Barrio Unquera

EKSTERORDINARA ĜENERALA KUNVENO DE HEF

La Prezidanto alvokas vin ĉeesti Eksterordinaran Ĝeneralan Kunvenon, kiu okazos la 21-an de julio de 2018 (sabate), je la 9:30 horo (je la 10:00 horo en dua alvoko), en la universitata rezidejo Teresa de Jesús de Madrid, laŭ la jena tagordo:

- 1.- Legado, komentoj kaj aprobo de la protokolo de la antaŭa kunveno (13 majo 2018).
- 2.- Revizio kaj aprobo de la kotizsistemo por 2019.
- 3.- Parta renovigo de la Estraro, se necese.
- 4.- Projektoj por 2018-2019.
- 5.- Sugestoj kaj demandoj.

GRAVA RIMARKO: La membroj de HEF, kiuj deziras esti reprezentataj fare de iu alia membro, bonvolu transdoni mesaĝon informante pri tio, klare indikante la kompletan nomon kaj de la reprezentanto kaj de la reprezentato, al HEFa retpoŝta adreso admin@esperanto.es, aŭ per ordinara poŝto al la oficejo de la asocio, antaŭ la 18a de julio.

La Prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio
José Antonio del Barrio Unquera

KUNVENO DE LA JUNULARA SEKCIO

HEF kunvokas kunvenon de la junulara sekcio, Hispana Esperantista Junulara Societo (HEJS), dum la 77-a Hispana Kongreso de Esperanto. La kunveno okazos la 20-an de julio, je la 19,30, en la rezidejo Teresa de Jesús (universitata areo de Madrido).

Oni pritraktos la reorganizadon de la sekcio, kun ebla elekto de nova estraro, kaj la iniciatojn por agadoj dum la venontaj monatoj. Ĉiuj anoj de HEF malpli ol 30-jaraĝaj estas kunvokataj. Ankaŭ povas ĉeesti aliaj esperantistaj junuloj ne membroj de la asocio, kaj ankaŭ anoj inter 30 kaj 35-jaraj, kiuj deziras alporti sian sperton.

ALIAJ KUNVENOJ DUM LA HISPANA KONGRESO

La 77-a Hispana Kongreso de Esperanto estos okazo por ke asocioj kaj grupoj de aktiuloj povas kunveni por kunlaborado.

Ekzemple, la Federacio faras alvokon al teknikaj kompetentuloj partopreni laborgrupon subtenantan la retajn projektojn de HEF. Tiu kunveno okazos probable en la mateno de la sabato 21-a.

Por la 21-a de julio je la 18:30 estas kunvokata kunveno de la hispana sekcio de ILEI.

Ĉiuj hispanaj instruistoj, kaj ankaŭ Esperanto-instruantoj estas invitataj partopreni la kunvenon.

SAT-en-Hispanio organizos sian propran kunvenon ankaŭ la 21-an de julio.

Ĉiu alia asocio, loka klubo aŭ grupo de interesatoj, povas peti spacon al la LKK de la kongreso por organizi siajn kunvenojn. La kunvoko estos publikigita en la publikaj aviz-tabuloj de la kongresejo, se oni tion deziras.



2018 
AÑO EUROPEO
DEL PATRIMONIO
CULTURAL
#EuropeForCulture

EŬROPA JARO PRI KULTURA HEREDAĴO

La Ministerio pri Kulturo de Hispanio havigis al Hispana Esperanto-Federacio la rajton utiligi la emblemon de la Eŭropa Jaro pri Kultura Heredaĵo 2018, por la kongreso de ILEI, kaj por la universitata simpozio okazonta en la lastaj du tagoj, akorde kun la ĉeftemo de ambaŭ eventoj: "La Kultura Heredaĵo de Esperanto".

PRI GRUPOJ KAJ ASOCIOJ

Andaluzio

MALAGO ESTOS LA SIDEJO DE LA HISPANA ESPERANTO-KONGRESO EN 2019



En la Ĝenerala Kunveno de Hispana Esperanto-Federacio kiu okazis en majo, la estraro informis pri la decido elekti Malagon kiel sidejon de la 78a Hispana Esperanto-Kongreso kiu okazos profitante la festojn de la komenco de majo 2019.

La renkontiĝo profitos la okazigon de la 71a ĉiujara Kongreso anual de la Inter-

nacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEFF), en datoj parte koincidaj, tiel ke eblos profiti la sinergiojn inter ambaŭ renkontoj.

La kongresoj estis prezentitaj dum la 70a Kongreso de IFEFF en Vroclavo (Pollando), kien vojaĝis kelkaj malagaj membroj de la organiza komitato, kaj oni prezentos ilin ankaŭ dum la Hispana Kongreso en Madrido.

Ni baldaŭ informos pri pluaj detaloj.

Sevilo

La dimanĉon 24-an de junio okazis en urbo Seviljo evento samtempe al aliaj en kelkaj hispanaj urboj.

Oni koincidigis la proponon de HEF (siavice de Duolingo) en tiu tago por kunigi la lokajn lernantojn kaj samideanojn kadre siavice de la livero de atestiloj por finiĝintoj en la loka kurso.

La celo estis tia kaj alia: pasigi agrablan tagon en Parko María Luisa kaj perfektigi en Esperanto okaze de la venontaj eventoj, nome, Badaĥoz, Madrido kaj Lisbono.

Kaj tiel okazis: tutesperanta kaj agrabla lingvo- etoso por konatuloj kaj ankoraŭ nekonata samideanaro.



Do tiel oni liveris la atesti-
lojn pri ĉeesto en la univer-
sitata kurso fare de la Uni-
versitato samkiel la ĉiujara
de la loka Sevila Asocio por
ĉiu kurso en nia urbo (ĉi-
kaze ankaŭ la sama universi-
tata).

Nur povis ĉeesti kelkaj el la
finiĝintoj. Al la ceteraj oni
donos la atestilojn kiam
ili havos pli da tempo
post ilia devo en aliaj
ekzamenoj.



La universitatan kurson
komencis 28 gelernantoj
kaj plimulto finis ĝin
(alia afero estis atingi la
tutajn 6 kreditojn univer-
sitatajn).

Ni daŭrigas en la strebo
por ke kiu ajn povu ĉi somere atingi eĉ plibonan fluparoladon por la venontaj cititaj
eventoj.

Antonio Rodríguez

Kanarioj

EKSPOZICIO EN LAS PALMAS DE GRAN CANARIA



Dum la du unuaj semajnoj de aprilo
eblis viziti ekspozicion pri Esperanto
en la Ŝtata Publika Biblioteko de Las
Palmas de Gran Canaria, organizita de
la Grupo Esperantista de Gran Cana-
ria. La elmontrita materialo konsistis
el la 15 konataj paneloj de HEF iom
aktualigitaj, 40 diverslingvaj lernoli-
broj de "Esperanto per Rekta Metodo"
de nia slovaka samideano Stano
Marĉek, alloga aro de plej konataj E-
revuoj, sufiĉe bunta elmonro de di-
verstemaj DVD-oj kaj KD-oj en aŭ pri
Esperanto, du grandaj vitroŝrankoj

La ekspozicio estis vizitata de sufiĉe granda nombro da interesuloj en tre ampleksa horaro ĉiutaga. La 12an de aprilo, Radio Tamaraceite (Dioceza Elsendejo de Kanarioj) dissendis unuhoran diskonigan intervjuon kun Antonio Sarmiento, delegito de UEA kaj membro de HEF, pri la ekspozicio mem kaj pri Esperanto ĝenerale.

Alakanto



EKSPOZICIO KAJ FULMKURSO EN ELCHE

Fine de aprilo estis muntita ekspozicio pri Esperanto en la lernejo por plenkreskuloj Mercè Rodoreda de la urbo Ilico (Elche / Elx), ene de aktivado por la paco organizita de la asocio Asociació Veïnal del Raval d'Elx, kun kunlaboro de la loka aktivulo Antoni Verdú. La

26an de aprilo oni organizis informan prelegon kaj fulmkurson pri Esperanto, kiun gvidis nia ano José Miguel Bernabeu.

Aragono

ESPERANTO DENOVE DUFOJE EN "DIARIO DE TERUEL"

La 30-an de marto, ene de sia serio pri elstaraj virinoj kiuj lasis sian spuron en la historio, la ĵurnalo *Diario de Teruel* publikigis artikolon pri Lidja Zamenhof, verkitan de Blanca Villarroya. Ĝi montris la eksterordinaran personecon de pioniro kun propraj meritoj, pereinta tre tragike.

En junio la vicprezidanto de la grupo Liberano, Eduardo Dolz, paroladis pri Esperanto en mezlernejo "Segundo de Chomón" de la aragona urbo Teruelo. En la foto, eblas vidi raporton redaktitan de unu el la studentoj mem, publikigitan de la loka ĵurnalo "Diario de Teruel".

• UTOPIAS Y DISTOPIAS • HACIA UN IDIOMA GLOBAL

El esperanto o "lenguaje ideal", más cerca de lo que pensamos

Una charla acerca esta lengua a los estudiantes del Segundo de Chomón

Rebeca Ceballos Plumed
Alumna de 1º de Bachillerato del IES Segundo de Chomón

A lo mejor algunos os preguntáis que es eso del Esperanto, bien, así nos encontramos algunos de nosotros hasta que tuvimos una muy interesante charla sobre él. Esta se enmarca dentro del proyecto de Historia del Mundo Contemporáneo sobre Utopías y Distopías que se lleva a cabo durante este curso.

Aprendimos que el Esperanto es el llamado "lenguaje ideal", esto se debe a que esta lengua fue creada y desarrollada para mejorar la comunicación internacional. Apareció en Varsovia cuando el médico Lázaro Zamenhof lo creó para conseguir una comunicación entre varios soldados de diferentes países y así evitar malentendidos.

Esta lengua funciona gracias a una gramática muy sencilla (con 16 reglas básicas), una neutralidad ante los idiomas ya existentes y que las raíces de las palabras se forman a partir de lenguas europeas. Con esta información podríamos pensar que es un pensamiento muy idealizado, pero al escucharlo de alguien que controla el tema, no lo es tanto; aproximadamente 100.000 personas hablan fluidamente el Esperanto, existen federaciones locales, nacionales y mundiales, una especie de intercambios para practicar la lengua, libros, revistas, cursos, páginas web... Y por muy lejano que nos parezca no lo está tanto, quizás no imaginamos que en Teruel había personas que puedan leer y hablar Esperanto.

Personalmente jamás habría imaginado que existieran tantas personas que lo practicasen y mucho menos en nuestra ciudad, donde tienen lugar unas clases semanales a las que se puede acudir si quieres aprenderlo, esto nos demuestra que es un lenguaje con mucha más importancia de la que le daríamos en un principio.

Pese a que el lenguaje en sí va no es un sueño, la utopía que persigue al esperanto es la globalización del lenguaje, pero poco a poco se van dando pequeños pasos para que sea más conocido, y todo gracias a personas día a día, que creen y cuentan tan efusivamente lo que les gusta.

Foto de grupo de los estudiantes que participaron en la actividad sobre el esperanto del IES Segundo de Chomón

Madrido

CONFERENCIA:
ESPERANTO Y GUERRA CIVIL
Martes 17 de abril de 2018 a las 19:00 horas

**Kion vi faras por
kviti tion**

Coronel
Julio
Mangada
Rosenorn

General
Emilio
Herrera
Linares

Cayetano
Redondo
Aceña
Alcalde de
Madrid

**GEESPERANTISTOJ EL LA TUTA
MONDO AGU ENERGIE KONTRAŬ
LA INTERNACIA FAŜISMO!**

Ponente: JOSE ANTONIO DEL BARRIO
Presidente de la Federación Española de Esperanto
Presenta: Fernando Cardenal Alcántara (Gefrema)

Biblioteca Pública
Municipal
Iván de Vargas

ORGANIZA:
GEFREMA
Grupo de Estudios del Frente de Madrid

**BIBLIOTECA PÚBLICA MUNICIPAL
IVÁN DE VARGAS
C/ SAN JUSTO, 5
28005 MADRID**

Metro: La Latina (L5), Ópera (L2, L5, R3), Sol (L1, L2, L3),
Tras de Malina (L1) - Autobús: 3, 17, 18, 23, 31, 50, 45

ENTRADA LIBRE HASTA COMPLETAR AFORO

PRELEGO PRI ESPERANTO EN LA HISPANA MILITO

La 17-an de aprilo, José Antonio del Barrio, prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio prelegis en la hispana pri la uzo de Esperanto dum la Hispana Enlanda Milito, en evento organizita de la asocio GEFREMA (pri historio de la milito en la madrida regiono). Li parolis pri la uzo de Esperanto por propagando, pri la altiro de eksterlandaj batalantoj kaj pri la agadoj de kelkaj renomaj esperantistoj. La prelego okazis en la Publika Biblioteko Iván de Vargas, kun ĉeesto de ĉ. 50 homoj kiuj plenis la salonon.

ĈEESTAJ RENKONTIĜOJ POR RETAJ LERNANTOJ

La 24-an de junio okazis specialaj renkontiĝoj por lernantoj de Esperanto en Madrido, Sevilo kaj Zaragozo, speciale destinitaj al la homoj lernantaj per la reto.

Oni profitis por tio la novan ilon de kreado de ĉeestaj renkontiĝoj kaj eventoj de la reta aplikaĵo por lingvolernado Duolingo. La renkontoj tamen ne estis limigitaj nur por uzantoj de tiu retejo, sed ankaŭ por uzantoj de aliaj lerniloj, partoprenantoj en kursoj aŭ memlernantoj.

En Madrido la renkonto disvolviĝis la dimanĉon 24an de junio ekde la 11a matene, en la Parko de Retiro, kaj partoprenis ĉ. 18 homoj.

Ĝi estis la unua okazaĵo de la t.n. kapitulo Madrido-Esperanto, ene de Duolingo. En tiuj ĉi momentoj Universala Esperanto-Asocio kunlaboras kun tiu entrepreno por ampleksigi la nombron de lokoj kie okazos tiaj aktivaĵoj en aliaj mondopartoj.

Tiuj personoj interesataj organizi renkontojn en siaj urboj, profitante tiun sistemon de Duolingo, povas kontakti Hispanan Esperanto-Federacion, por kunordigi la detalojn.



GABAĈO ĈE HISPANA ESPERANTUJO

Hispanoj nomas afable (aŭ ne) la francojn: *gabaĉo*.

Dum la lasta vintro, mi biciklis tra unu el la plej belaj regionoj en Esperantujo : Hispanio. Konkrete, mi malkovris la Kanariojn. Mi biciklis ĝis Kadizo, kie mi enŝipiĝis por atingi Lanzarote. Mi vizitis ĉiujn insulojn krom El Hierro. Poste mi revenis sammaniere de La Palma al Kadizo kaj per trajno de Alikanto al Francio ĉar mia korpo ne plu bone funkciis...

Sume, preskaŭ 5000km de septembro ĝis majo.

Post partopreni en la katalunaj kultura semajno kaj kongreso, mi profitis de la gastigado de kelkaj samideanoj dum la iro kaj la reveno. Dank'al ili mi esperantumis (kaj iomete krokodilis) en tre bona etoso kaj mi povis kuraciĝi de multaj diversaj doloroj.

Kiel gabaĉa respublikano, mi estis ĉe la tombo de Antonio Machado en Collioure, la nova muzeo Miguel Hernandez en Quesada (Ĥaeno) kaj la fondaĵoj Negrin en Las Palmas kaj Rafael Alberti en El Puerto de Santa Maria.

Emocie, mi trapasis la limon inter Cerbère kaj Port-Bou, kiel multaj refuĝintoj en 1939.

En Fuerteventura, la spuroj de respublikanaj malliberuloj preskaŭ ankoraŭ estas videblaj sur la sablo de Jandia.

Promenante en Hispanio, ofte mi pensas pri tiuj viroj kiam mi tendumas apud akvobaraĵo aŭ veturas sur verda vojo aŭ tra tunelo faritaj de tiuj sklavoj.

Mi ne komprenas kiel multaj el ili ne ripozas en digna tombejo kaj ankoraŭ troviĝas kelkfoje, kiel bestoj, sub la radoj de Rocinante (tial mi nomis mian biciklon).

Por image «plialtigi» la esperantajn valorojn, mi kunportis la verdan stelon kiel eble plej alten.

En Tenerifo, mi atingis biciklante la piedojn de la Teide je 2400m (vidu fotojn) sed mi devis retroiri pro la malbona vetero. Eble alia samideano povos kunporti ĝin pli alte per la telfero (aŭ jam tion faris) kiam malaperos la neĝo...

Memoraĵoj el Kanarioj : tre diversaj mirindaj pejzaĝoj, marbordo kaj montaro samtempe, afablecego de la loĝantoj, bonaj vinoj kaj bonegaj fromaĝoj! Paradizo por piedirantoj (ne por biciklantoj).

Dankon denove al Pakita, Ĥesus, Ivan, Ĥusto, Liya kaj la Antonioj! Sen ili, tion mi ne povus plenumi.

Ĝis la venontan jaron ĉar Rocinante deziras koni Finnlandon!

Kaj plenan sukceson en la lisbona, madrida kaj badaĥoza kongresoj!

Korajn salutojn el Gabaĉio al miaj ĉiamaj hispanaj geamikoj!

Frederik Neyret

INSTRUADO EN LA UNIVERSITATO UNED

Estis jam subskribita la interkonsento inter la Nacia Universitato de Neĉeesta Edukado (UNED) kaj Hispana Esperanto-Federacio por inkludi la studojn de Esperanto inter la lingvoj proponitaj en la centro CUID (Universitata Bitaj kaj Neĉeesta Lingvo-Centro) de tiu universitato, la plej granda en Hispanio laŭ nombro da lernantoj.

Dum la venontaj tagoj la UNED malfermos la kunvokon por selekti la instruiston de la kurso. Nun oni prilaboras la necesajn instrugvidilojn.

La kunvoko por la lernantoj malfermiĝos post la somera paŭzo.

La UNED, konkrete la madrida sidejo de la Fakultato pri Humanismaj Studoj, estos unu el la sidejoj de la venontaj kongresoj de Esperanto en Madrido, inklude de kelkaj el la plej formalaj aktivaĵoj, kiel inaŭguroj, simpozioj, artaj vesperoj kaj ekspozicioj. Informojn pri la instrumentoj de UNED estos montrataj dum la Hispana Kongreso, en diversaj prezentadoj.

LA NOKTO DE LA LIBROJ EN HEF-SIDEJO

La vendredon, 20-an de aprilo, Madrida Esperanto-Liceo (MEL), estis invitita partopreni en la prestiĝa evento "la Nokto de la Libroj", organizita de la registaro de la Madrida Regiono. Oni prezentis, unuafoje en Madrido por la ĝenerala publiko, la tradukon al Esperanto de antologio de poemoj de la granda hispana poeto Miguel Hernández, kiun Hispana Esperanto-Federacio eldonis okaze de la 75a datreveno de la morto de la poeto. La agado disvolviĝis en la sidejo de la Federacio, kaj ĝin gvidis la tradukisto, la esperantista verkisto Miguel Fernández.

Abel Montagut

Utnoa
Poema épico



LA POEMO DE UTNOA EN LA HISPANA

Aperis versio en la hispana lingvo de "Poemo de Utnoa", sub la titolo "Utnoa. Poema épico". La aŭtoro estas Abel Montagut, konata verkisto en Esperanto kaj en la kataluna lingvo, kaj tradukisto de katalunaj verkoj, inter alie de Ausiàs March kaj Salvador Espriu.

La libro estas aĉetebla en specialiĝintaj librovendejoj.

ESTONTAJ GEESPERANTISTOJ



Niaj madridaj samideanoj Mati Montero kaj Félix M. Jiménez Lobo (ekssekretario de HEF) naskis infanon la pasintan aprilon. La bebo nomiĝas Luis (esperante: Ludoviko) kaj naskiĝis aprilo la 14an, ĝuste la datreveno de la forpaso de L.L. Zamenhof. Rigardu la verdajn stelojn de la beba vestaĵo, kiu estas donaco de la madridaj samideanoj al li.



Ankaŭ nia samideano Raúl Martínez Anguita, membro de la estraro kaj lia edzino Julie, naskis belegan bebon, kiu dolĉe dormas kaj eble jam pripensas kiel oni diras “papá” en esperanto.

ESPERANTO KOMUNIKO



Profesoroj de la projekto

Eŭropa Unio aprobis la projekton "Esperanto Komunikio", (projekto de grupo da profesoroj de Vélez Málaga por disvastigi Esperanto), prezentita de nia samideano Fabián Jiménez. Estis elektitaj nur 18 el la tuta Hispanio, el kiuj nur 2 estis de Andaluzio, kaj unu el ili estis la projekto "Esperanto Komunikio" kiu finfine fariĝis realo, ĉar oni laboras de antaŭlonge. La subvencio estas 18,000 €. La grupeto de profesoroj de Vélez vojaĝos al Italio, Grekio, Hungario, Litovio kaj Francio por trejni kaj lerni kiel ili laboras kun Esperanto tie.

Unue Fabián devas vojaĝi al Logroño por partopreni en prepara konferenco por Erasmus Plus Projekto. En venonta bulteno oni plu informos pri la grava afero.



Gelernantoj de la Instituto kie instruas Fabián

Dokumentoj alvenintaj al la biblioteko en 2016-2017

Dum la jaro 2016 -2017 eniris la bibliotekan katalogon sekvaj dokumentoj:

Donacinto: Anonimo

- “Beletra almanako”. N-ro 28 (februaro 2017).
- “Beletra almanako”. N-ro 29 (junio 2017).
- “Beletra almanako”. N-ro 24 (oktobro 2015)
- “Beletra almanako”. N-ro 25 (februaro 2016)
- “Beletra almanako”. N-ro 27 (oktobro 2016).
- Denis, León. “Post la morto: elvolvo de la doktrino de la spiritoj”. Associação Editora Espírita F. V. Lorenz, 2016

Donacinto: Aitor Arana

- Arana Luzuriga, Aitor. “Esperantoa ikasgai”. [Bilbao]: Joseba Berriotxoa, 2016
- Arana Luzuriga, Aitor; Jansen, Wim. “Ni lernu la eŭskan: gramatiko kaj ekzercoj”. [Bilbao]: Joseba Berriotxoa, 2016

Donacinto: Aldis Bušs

- Rainis, Jānis. “Antaŭen”. Rigo: Radieto, 2005.

Donacinto: Amparo de la Sota

- Einstein, L.; Zamenhof, L. L. “Esperanto?: a idéia de uma lingua auxiliar internacional desde Leibniz até hoje”. Lisboa: Argo, 1942

Donacinto: Antoni Martí

- Bays, Gersi Alfredo. “El profeta de Pedras: novela escrita originalmente en esperanto”. Chapecó: Fonto, 2017.

Donacinto: Associação Editora Espírita F. V. Lorenz

- Benson, Robert Hugh. “La vivo en la nevidata mondo: detala priskribo de la postmorta vivo ricevita mediume de Anthony Borgia”. (1^a eld.). Rio de Janeiro: Associação Editora Espírita F. V. Lorenz, 2016.

Donacinto: Biblioteca Nacional de España

- Cervantes Saavedra, Miguel de; Lucía Megías, José Manuel. “El “Quijote” universal: (150 traducciones en el IV Centenario de la muerte de Miguel de Cervantes)”. Madrid: Asociación Cultural La Otra Andalucía: Facultad de Filología de la Universidad Complutense de Madrid: Machado Grupo de Distribución, 2016

Donacinto: Darío Rodríguez, la familio de

- Bacquer, Jean. “La kunprinclando Andoro, lasta feŭda ŝtato”. Marmande: Esperantaj Francaj Eldonoj, [1962]
- Bastien, Louis. “Vocabulaire de poche français-Esperanto: suivi d’un aide-mémoire Esperanto-français”. Paris: Librairie centrale espérantiste, 1947
- Bremón Masgrau, Jacint. “¿Quiere usted aprender esperanto: manual de la conversación esperanta: método Willemanns”. Barcelona: Atlante, [ca. 1930]
- Chavet, Gabriel; Warnier, Georges. “Esperanto manuel: cours pratique et complet en 15 leçons”. Paris: Union esperantiste française, 1950
- Fernández Menéndez, Manuel; Vaz Ferreira, Carlos. “Fermentario”. Montevideo: Urugvaja Esperanto-Societo, 1960
- Fernández, Miguel. “Poezio: armilo ŝargita per futuro: komentita antologio de hispanlingva poezio kontestema, engaĝiĝinta, socia kaj revolucia”. [Madrid]: Asociación Izquierda y Esperanto-SATeH, cop., 2013
- Galadí-Enríquez, David; Wandel, Amri. “La kosmo kaj ni: galaksioj, planedoj kaj vivo en la universo: elementa kurso pri astronomio”. Antverpeno: [Zaragoza]: Flandra Esperanto Ligo; Fundación Esperanto, 2001
- Gibrán, Kahlil. “La profeto”. La Laguna: J. Régulo, 1962
- Grau Casas, Jaume. “Curs complet de la llengua internacional esperanto: (gramàtica, exercicis i diccionari)”. Barcelona: Federació Esperantista Catalana, 1934
- Gutiérrez Adúriz, Miguel. “Diccionario 2002 vortaro: español-esperanto, esperanto-hispana”. Santander: Mga, [2002]
- Jégard, Zef. “Avo biciklas ĉirkaŭ la mondo”. Yffiniac: Liber-rado, 2004
- Poblet i Feijoo, Francesc; Alós i Font, Hèctor. “Història de l’esperanto als països catalans: recull d’articles = Historio de esperanto en la kataluna landaro: artikolkolekto”. [Sabadell]: Associació Catalana d’Esperanto = Kataluna Esperanto-Asocio, D. L. 2010
- Poblet i Feijoo, Francesc. “Els inicis del moviment esperantista a Catalunya = La komenca esperanto-movado en Katalunio”. Sabadell: Constantí (Tarragona): Associació Catalana d’Esperanto = Kataluna Esperanto-Asocio; O Limaco, [2004]
- “Spirita juvelaro: katolika preĝolibro”. Den Haag: A. N. Govers, 1910
- Thézard, Joël. “Polusaj glacioj sub noktomeza suno: vojaĝnotoj ilustritaj per 30 laŭnaturaj desegnoj, fotoj, akvareloj kaj du kartoj”. Paris: Société française pour la propagation de l’espéranto, [1937?]
- Vanselow, Karl. “Nia lingvo Esperanto. Unua serio: Ardesia-eldono”. Berlin: Berliner Esperanto-Verlag, [ca. 1950]
- Verda, Myrtle; Verda, Vilĉjo. “Kudra kaj trika terminaro”. Heronsgate, Rickmansworth, Herts.: Universala Esperanto-Asocio, 1947

Donacinto: Eduardo López Pascual

- López Villanueva, Antonio; Martínez García, Salvador. “Obra original para guitarra”. [Murcia]: Salvador Martínez García, 2014

Donacinto: Gian Carlo Fighiera

Figliera, Gian Carlo. “La lastaj tagoj de Ada, Aduŝka”. (3a eld.). Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 2010.

Figliera, Gian Carlo. “L. L. Zamenhof: la homo kaj lia idearo en liaj propraj vortoj”. [Torino]: Torina Esperanto-Centro, [2016]

Donacinto: Irek Bobrzak

Zamenhof, L. L. “Język międzynarodowy: przedmowa i podręcznik kompletny: por poloj”. Warszawa: Polski Związek Esperantystów, 2017.

Donacinto: Jolanta Kieres

Baláž, Peter. “Bela estas Sonĉa Tero = (Piękna jest Sadecka Ziemia)”. [Partizánske]: Espero, [2012?].

Sochacki, Andrzej. “Grundtvig-Seminario en Herzberg am Harz la Esperanto-urbo en Germanio, 23-27.05.2015”. [Herzberg am Harz?]: [s.n.], [2015?].

Donacinto: Jorge Camacho Cordón

Grau Casas, Jaume. “Amaj poemoj”. Barcelona: [s.n.], 1924.

Reza, Jasmina. “Arto”. Thaumiers: La KancerKliniko, 2011.

Pejno, Simono. “Ĉapelilo 2.0: manlibro por uzantoj”. (2a eld.). [Frankfurt am Main]: Antwerpen: Professional Consulting; Flandra Esperanto-Ligo [distribuanto], 1996.

Krishnamurti, J. “Eduko kaj vivsignifo”. Laroque Timbaut: Cercle espérantiste de l'Agonais Laŭte!, 1980.

Watanabe, Aiko. “Fabeloj el la budhisma literaturo”. (1a eld.). Nagoya: Japana Budhana Ligo Esperantista, 2002.

Minnaja, Carlo. “Historio de la esperanta literaturo”. (1a eld.). La Chaux-de-Fonds: Kooperativo de Literatura Foiro, 2015.

Čapek, Karel. “Karel Čapek: unu el reprezentantoj de la ĉeĥa literaturo kiel fenomeno universale homa: antologieto el lia verkaro kun konciza priskribo de lia signifo, biografio kaj bibliografio”. Prago: Paco, 1987.

Némirovsky, Irène. “La balo”. Thaumiers: La KancerKliniko, 2016.

Sturluson, Snorri. “La Edda”. Novjorko: Mondial, 2008.

Miyazawa, Kenzi. “La ĝemelaj steloj kaj aliaj”. Tokio: Japana Esperanto-Instituto, 1984.

Grau Casas, Jaume. “La lasta poemo”. Barcelona: [s.n.], 1936.

“La plej forta voĉo de la paco: kolekto de poemoj el El popola Ĉinio”. Peking: Fremdlingva Eldonejo, 1952.

Erasmus, Desiderius. “Laŭdo de l' stulteco”. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 1988.

Zamenhof, L. L. “Lingvaj respondoj, konsiloj kaj opinioj pri Esperanto”. (7a eld.). [Kioto]: Ludovikito, 1990.

Inoue, Yasushi. “Loulan; kaj Fremdregionano”. Japana Esperanto-Instituto, 1984.

Mallia, Carmel. “Malta nuntempa poezio”. Valletta, Malto: Malta Esperanto-Societo, 2009.

Jansson, Tove. “Muminvalo: la nevidebla infano kaj aliaj rakontoj”. (2a reviziita eld.). Helsinki: Esperanto-Asocio de Finnlando, 1993.

Kawabata, Yasunari. “Neĝa lando”. (2a rev. eld.). Tokio: Libroteko Tokio, 1992.

- Grimm, Jacob. “Neĝulino kaj aliaj fabeloj”. (2a eld.). Amsterdam: Libroservo Federacio de Laboristaj Esperantistoj, 1939.
- Campolo, Giuseppe. “Poesia da tutti i cieli: antologia del Premio - Terza edizione 2016 = Poezio el ĉiuj ĉieloj: antologio de la Premio - Tria eldono 2016”. Venafro: EVA, 2016.
- Japana Esperanto-Kongreso (100a. 2013 Tokio). “Raporto pri publika preleg-kunveno de la 100-a Japana Esperanto-Kongreso: Esperanto en Japanio, Japanio en la Esperanto-movado: lerni de historio por estontaj perspektivoj”. Tokio: Japana Esperanto-Instituto, 2014.
- Sinha, Lakshmiswar. “Tri bengalaj fabeloj”. Stockholm: Förlagsföreningen Esperanto, [1930].
- “Albumo pri Ĉinio”. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1984
- Berveling, Gerrit. “La bona mesaĝo de Jesuo: laŭ Johano”. Chapecó: Fonto, 1992
- Berveling, Gerrit. “La bona mesaĝo de Jesuo: laŭ Luko”. Chapecó: Fonto, 1992
- Berveling, Gerrit. “La bona mesaĝo de Jesuo: laŭ Marko”. Chapecó: Fonto, 1992
- Berveling, Gerrit. “La bona mesaĝo de Jesuo: laŭ Mateo”. Chapecó: Fonto, 1992
- Berveling, Gerrit. “Nombroj: biblia libro”. Chapecó: Fonto, 1999
- Chiussi, Italo. “Je la flanko de la profeto”. Antverpeno: TK, 1978
- Cipriano, Sankta, Episkopo de Kartago. “La unueco de la Katolika Eklezio”. Zwolle: VoKo, 2006
- Gallego, Rubén. “Blanko sur nigro”. Novjorko: Mondial, 2007
- Ibsen, Henrik. “Imperiestro kaj galileano: mond-historia teatraĵo”. Zutphen: W. J. Thième&Cie, 1930
- Irving, Washington. “Rip van Winkle”. Thaumiers: La KancerKliniko (2009??)
- Snorri Sturluson. “Sagao de Egil”. Novjorko: Mondial, 2011
- Risojević, Ranko. “Bosniaj elegioj”. Banja Luka: Komunuma Organizo de Esperanto-Junularo, 1986
- Rossi, Nicolino. “Napolo kaj ties ĉirkaŭaĵoj: (historio, arto, folkloro): gvidlibro”. Napoli: Napola Esperanto-Asocio = Associazione Esperantista Napoletana, [ca. 2008]
- Szilágyi, Vilmos. “Szerelmi kultúránk: képeskönyv a szexről”. Budapest: Magyar EszperantóSzövetség, 1988
- Szyborska, Wisława. “Mi inventas la mondon = (Obmyślam świat)”. Bjalistoko [ktp.]: Książnica Podlaska im. Łukasza Górnickiego w Białymstoku: Białostockie Towarzystwo Esperantystów, 2015
- Donacinto: José M^a Salguero (Kani)
- Padín Gallo, Félix. “República, guerra y campos de concentración: memorias de un anarquista bilbaíno”. Madrid: Fundación Anselmo Lorenzo, 2017.
- Bastien, Georges. “La liberecana socio”. Paris; Leipzig: Sennacieca Asocio Tutmonda, Eldona Fako Kooperativa, 1932
- Bayol, Georges. “Guida Esperanto de la Croce-Rossa: (eldono itala)”. [S. l.]: [s. n.], 1913
- Blok, H. “Aanhangsel tot den Esperanto-sleutel: inhoudende ca. 2000 woorden Nederlandsch-Esperanto”. Rotterdam: Zwagers, 1916
- Bruin, G. P. de. “Laborista Esperanta Movado antaŭ la mondmilito: faktoj kaj dokumentoj kolektitaj de G. P. de Bruin”. Parizo: Sennacieca Asocio Tutmonda, 1936

Ĉefeĉ, E. “[Esperanto-ŝlosilo]: (juda)”. [Israelo?], [ca. 1910]
Ĉefeĉ, E. “Cheia limbei Esperanto: (rumana)”. București: [E. Ĉefeĉ?], [190?]
Ĉefeĉ, E. “Esperanto atslēga: (latva)”. Rīgā: Krauze, [ca. 1929]
Ĉefeĉ, E. “Esperanto key = Esperanto-ŝlosilo”. Washington, D. C.: American Esperantist Company, [ca. 1910]
Ĉefeĉ, E. “Esperanto raktas: (litova)”. Kaunas: Mintis, 1929
Ĉefeĉ, E. “Kl'uč jazyka Esperanto: (slovaka)”. Bratislava: Sváz Čs. Esperantistov, 1929

Ĉefeĉ, E. “Klucz do Esperanta: (pola)”. Jasło: "Esperantista Voĉo", [ca. 1930]
Ĉefeĉ, E. “Nyckel till Esperanto”. Stockholm: Svenska Esperanto-Förbundet, 1920
Ĉefeĉ, E. “Tout l'Esperanto et le moyen de l'apprendre sans leçons en lisant une petite histoire”. Paris: Librairie-Imprimerie Espérantiste, [ca. 1905]
“Esperanto: grammatikk og ordlister Esperanto-norsk og norsk-Esperanto”. Oslo: Arbeidernes Aktietr., [ca. 1930]
Herranz Hammer, Albert. “La Balkanaj = Les Balcàniques”. [Palma de Mallorca]: Majorka Esperantistaro, [2002]

Donacinto: Kawara Hiro

Kawara, Hiro. “Nia 70a komento: 70 jarojn post la dua mondmilito, ni kundividis personajn spertojn pri la historio”. Tokio: Kawara, 2016

Donacinto: Korea Esperanto-Asocio

Cho, Sung Ho. “Korea antologio de noveloj”. (2a eld.). [Seulo]: Korea Esperanto-Asocio, 2017.

Donacinto: Leandro Trujillo Casañas

Trujillo Casañas, Leandro. “Juan Régulo Pérez, una aproximación a su vida y obra”. San Cristóbal de La Laguna: Sociedad Esperantista de Tenerife, 2017.

Donacinto: Librostoko de HEF

Paluzie-Borrell, J. “Diccionario esperanto-español y español-esperanto: selección de 25000 voces con los términos usuales y científicos: reglas de pronunciación y gramática del esperanto”. (Nueva ed. rev.). Barcelona: Sopena, [2004].

Donacinto: Manolo Parra

Maeso, María Ángeles. “Vamos, vemos = Ni iras, vidas”. (3^a ed.). Ocaña, Castilla La Mancha: Lastura, 2017.

Il de Di. “2048: Karmen kaj Peter”. (1a eld.). Quierschied: Eldonejoferlag, 2013.

Donacinto: Miguel Gutiérrez Adúriz

Llano, Manuel. “Ombroj sur verda pejzaĝo”. Santander: Kantabra Esperanto-Asocio, 2012

Donacinto: Nan Youli

Ba, Jin. “Frosta nokto”. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1990

Donacinto: Pedro Zurita

Manüel. “Ĉu plu ekzistas amo? “Udine: Rovere Emanuele, 2012.

Kreitz, Joseph. “Historio de la Esperanto-movado inter la blinduloj, 1888-2015”. [Keuruu]: Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (LIBE), 2016.

Privat, Edmond. “Vivo de Zamenhof”. (6a eld. / redaktis Ulrich Lins). Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 2007.

Donacinto: Radojica Petrović

Ivanović, Živko. “Antologio de la serba parola literaturo”. Beograd: Serbia Esperanto-Ligo, 1991.

Wennergren, Bertilo. “Detala gramatiko de Esperanto”. Partizánske: E@I kaj ILEI pere de Espero, 2010.

Kováts, Katalin. “Manlibro pri instruado de Esperanto”. (3a eld.). Partizánske: ILEI kaj E@I pere de Espero, 2009.

Donacinto: Rafaela Urueña

Fettes, Mark. “Fundamento de la homaj rajtoj”. [Roterdamo]: UEA, 2016.

Donacinto: Roberto Garvía

Espero Kataluna. “Tutmonda espero: (kataluna esperantisto): ĉiumonata revuo organo de la kataluna esperantistaro”. Barcelono: Societo Espero Kataluna.

Donacinto: Roman Dobrzyński

Dobrzyński, Roman. “Bona Espero nia tero”. Varsovio: R. Dobrzyński, 2014.

Dobrzyński, Roman. “Esperanto-Urbo kaj...”. Varsovio: R. Dobrzyński, 2016.

Dobrzyński, Roman. “Kiel savi Galapagojn”. Varsovio: R. Dobrzyński, 2016.

Dobrzyński, Roman. “Metropolo de tri imperioj”. Varsovio: R. Dobrzyński, 2016.

Dobrzyński, Roman. “Nokturno Bona Espero”. Varsovio: R. Dobrzyński, 2016.

Dobrzyński, Roman. “Sinjoro Tadeo parolas Esperante = Pan Tadeusz mówi po Esperancku”. Varsovio = Warszawa: Pola Esperanto-Asocio = Polski Związek Esperantystów, 2017.

Donacinto: Xosé L. Lourenzo Vidal

Rodríguez Fer, Claudio. “A cabeleira: (fragmentos): (poema en 60 idiomas)”. [Santiago de Compostela]: [s. n.] 2016

OMAĜO AL DON RICARDO CODORNIU I STÁRICO



La sabato 9an de junio (tri tagojn post la 172-a datreveno de lia naskiĝo) la urbo de Guardamar (Alakanto) honoris (laŭ la propono de Esperanto-Guardamar-Grupo) la inĝenieron Don Ricardo Codorniu i Stárico kun tri aktoj en sia honoro.

La Urbestro Sinjoro, Don José Luis Sáez Pastor, inaŭguris (en la muzeo kie loĝis la inĝeniero Mira kaj situas la Turisma Oficejo) la Ekspozicion de la originalaj ilustraĵoj (elmontritaj en la eldono memoriga de la asocio Cartagena CREECT, kies prezidanto Don Santiago del Álamo, eldonis "el cuento 12+1" la historion 12 + 1) el la libro de rakontoj, *12 arboj* kiu, en 1914, Codorniu dediĉis al siaj dek du nepoj. Li ankaŭ emfazis la grandan gravecon de la inĝeniero Codorniu (same kiel la inĝeniero Mira) en la reforestado de la dunoj de Guardamar por ripari la sablojn, kiuj minacis enterigi la tutan urbon (ĉirkaŭ 40 domoj estis enterigitaj de la sabloj). La urbestro akompanis la ceremonion de la Konsilisto pri

Edukado kaj Kulturo, Doña Pilar Gay Bódalo, kaj la Konsilisto pri la Medio, Don Silvestre García Barberá, same kiel la urbaj teknikistoj de Historio, Medio kaj Turismo.



Poste, la nepo de Don Ricardo Codorniu, Don José Luis Cáceres, Prezidanto de la Carolina Codorniu-Asocio kaj en nomo de la Familio Codorniu (pluraj generacioj de posteuloj de Murcia, Madrido kaj Alakanto ĉeestis al la evento), kiuj resumis la vivon kaj la verkon de lia eminenta prapatro.




Tiam, la partoprenantoj piediris laŭ la Promenejo Ingeniero Miras al la Placo kaj Rotonda por ĝia inaŭguro. Tie, pluraj esperantistoj prenis la plakon: Don José Miguel Bernabéu (akompanata de lia patrino, Donja Dolores) informis nin pri la Esperantista Kolektivo, kiu renkontiĝis ekde 1984 en la pinaro de Guardamar, seninterrompe, ĉiun unuan dimanĉon de septembro; kaj du membroj de la Esperanto-Guardamar-Grupo, Don Mikaelo Ángel Juárez kaj Doña Lola Pérez, parolis pri la ligo de Codorníu al Esperanto, kiu reliefigas la gravecon de ĉi tiu universala lingvo en la plilongigo de arbara kono de la inĝeniero: "Esperanto estis tre valorhelpa por mia arbara propagando. Danke al Esperanto, mi aktive subtenis respondecon kun arbaroj de Aŭstrio, Kanado, Ĉilio kaj Alĝerio. Mi ŝuldas al li longajn horojn da intensa kontentigo kaj, parte, miaj modestaj sukcesoj kiel propagandisto de la arbo kaj la monto. " R. Codorníu.

Post la inaŭguro de ambaŭ simboloj (Placo kaj Rotondo) pri la media kaj idiomata bona laboro de Codorníu kaj Zamenhof (ĉi tiu lasta kreinto de la universala lingvo Esperanto), kaj ankaŭ la rilatajn fotojn, tre ĝojis la parencoj de Codorníu kaj la ceteraj Atestantoj, la sperto de la momento kaj loko por vidi la konfluan de la tri amoj en la vivo de la Arbar-Inĝeniero, s-ro Ricardo Codorníu: lia familio, la arbo kaj Esperanto.

Esperanto-grupo Guardamar

RAPORTO PRI LA 70-A KONGRESO DE INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO-FEDERACIO OKAZINTA EN VROCLAVO DE LA 19A ĜIS LA 25A DE MAJO 2018



Bedaŭrinde pro diversaj kialoj, grupeto da malaganoj, ĉeestis du tagojn malfrue la 70-an IFEF Kongreson, okazinta en la belega pola urbo Vroclavo, mia edzino Mariló, Carlos kaj Conchi, kolegoj de la malaga grupo kaj membroj de

la LKK, partoprenis ĉi kongreson kun la ideo akiri sperton kaj fine preni la flagon por organizi la venontan eventon en Malago; kaj ĉio iris glate kaj bonetose. La inaŭguro estis sukcesa en la arta Universitata Oratorium Marianum de la urbo, kaj post la inaŭguro kaj komuna foto, la plimulto vizitis piede parton de la urbo, kiu estas la tria de Pollando kaj unu el la plej belaj, mi asertas tion, ĉar ni spertis la ceterajn ekskursojn piede tra la plej interesaj partoj kie ni ĝuis arton, belecon kaj amuzan serĉadon de bronzaĵoj gnomoj “koboldoj”, ĉar estas pli ol 300 tra la tuta urbo situataj ie ajn, apud pordoj de oficialaj konstruaĵoj, sur benkoj, ene de haloj, ktp.



Kvankam ni ne ĉeestis la Nacian Vesperon, mi scias ke ĝi okazis kun granda sukceso, ĉar koncertis la ensemblo "DeMoLo", tre konata en Pollando kaj la ensemblo de kantoj kaj dancoj "Legnika". Mi ne povas nek kuraĝas diri multe pri ili, ĉar kiel dirite mi ne ĉeestis la koncertojn.

La vetero estis tre agrabla matene kaj vespere kaj la loĝantaro bone disciplinaj, respektemaj, simpatiaj, ktp.



Laŭ la ĉiutaga programero, okazis krom la kutimaj kunsidoj pri fervojaj aferoj, interesaj esperanto-kursoj por komencantoj kaj paroliga kurso por komencintoj, ateliero pri kiel efike kunlabori kun redakcioj / ĵurnalistoj, gvidita de Alfred Schubert kaj vizito al Botanika Ĝardeno...

En luksa kaj belega salono de la enorma urba Stacidomo, Kaŝi - Carsten Schnathorst, blindulo

kun "ora voĉo" kaj lertaj manoj ludante pianon, koncertis proksimume dum unu horo. Tuj poste, oni prezentis kun granda spektado, per filmo kaj belegaj bildoj aranĝitaj de Carlos Spinola, la venontan kongreson okazonta en la hispana urbo Malago





La faka ekskurso okazis marde kun tagmanĝo en kampara restoracio "Magnolia" antaŭ ol viziti la faman fervojan muzeon en la Jaworzyna Śląska, urbo en la provinco de Malsupra Silezio per trajno kaj vizito al Ŝwidnica belega urbo kun la grandioza katedralo de Sanktaj Stanislao kaj Wenceslao, notindaj konstruaĵoj kaj luksa kaj originala protestanta kirko, tre simila al katolikaj preĝejoj, sed kun apuda tombejo, blankaj statuoj kaj manko de sonorilturo.

Merkrede krom movadaj aferoj, e-kurso por komencantoj kaj paroliga kurso por komencintoj

kaj ateliero pri ĵurnalismo kun komputila programo WordPress gvidita de Alfred Schubert, pli ol sepdek homoj vizitis la urbon per la ŝipo "Wratislavia" kun vespermanĝo kaj koncerto de la ensemblo "Noproblem" el Ĉeĥio. Tuj poste kelkaj homoj promenadis tra la malnova kvartalo Ostrów Tumski kie oni lumigas la stratojn per gas-lampoj kaj aliaj elektis promenadon bicikle.

Ĵaŭde ni ĝuis tuttagan ekskurson tra la Valo de Palacoj kaj ĝardenoj kaj Parko de miniaturoj en Kowary en Malsupra Silezio. Tiu ekskurso estis vere interesa, ĉefe la Parko de Miniaturoj kun belegaj reproduktaĵoj de la plej famaj palacoj kaj domoj.





Denove en la urbo ni partoprenis la Ĝisrevidan vesperon: vrocavanoj kaj kongresanoj, kun solena fermo akompanata de vort-muzika spektaklo kaj poemoj interpretitaj de vrocava grupo da esperantistaj artistoj, membroj de la Universitato de la Tria Aĝo, io simila al hispana spektaklo "Vivu la Teatro" kaj la blinda instrumentisto kaj kantisto Wojciech Lawnikowicz (nomata Wojtek) kantprezentis kelkajn belsonajn kantojn akompanataj de gitaro, kaj por kroni la vesperon, JoMo interpretis kelkajn konatajn kantojn. Nia grupo prenis la flagon de la venonta kongreso, kaj Carlos Spinola kaj mi, salutis nome de HEF kaj gratulis la bonan laboron kaj la sukcesan eventon.

Vendrede matene ni forflugis al Hispanio, sed la kongreso daŭris per kelkaj kunvenoj kaj forveturo al la urbo Krakovo por partopreni la postkongreson. Laŭ

la kongresa libro estis programite Promenado tra la malnova urbo, tuttaga ekskurso al fama salminejo, kultura programo - kunveno kun lokaj esperantistoj, en Wieliczka, ekskurso al Wawel kaj Kazimierz (juda kvartalo), kultura kaj arta programo. Forveturo

(Stacidomo Kraków Główny aŭ trajne al flughaveno Kraków - Balice.

La vivnivelo en Pollando estas malpli alta ol Hispanio kaj ni ĝuis bongustan bieron kaj manĝojn. La hotelo Piast (Kongresejo), kie ni gastis estas tre komforta kaj rekomendinda loko.

Ángel Arquillos



ESPERANTA POEZIO MALGRAŬ PLUVO

Jam de pluraj jaroj, la kunlaborado inter madridaj hispan- kaj esperant-lingvaj poetoj ĉiam pli oftas, fortas kaj fruktodonas (publikaĵoj, radioprogramoj, opaj deklamadoj sur publikaj placoj...). La pasintan 23an de majo, dudeko da poetoj (inter ili, mi mem, “la kunulo, kiu verkas Esperante”) refoje estis invititaj partopreni novan poemdeklamadon migran (de placo al placo) en la renoma madrida kvartalo Malasaña, en la kompanio de violonisto. Kiel ĉiujare, la aranĝon organizis la madrida kultura centro Conde Duque, kunlabore kun la UNO-agentejo ILO (Internacia Labor-Organizo).

Sed ĝuste en la momento, kiam la bardaro kaj la muzikisto (vere virtuoza) komencis la poezi-celan kunpromenon, ekpluvis, ve!... Kaj poste pluvis ade kaj ree... Ni vidis nin devigataj plenumi la programon en la tegmentitaj kortoj, ĉambroj, koridoroj... de la centro Conde Duque. Sed tie la poezio supersunis la veteran aĉecon. Multaj versoj de miaj kolegoj ravis min; kelkaj, ĉefe soci-kritikaj, skuis mian konsciencon... Miaflanke, kiel kutime, mi deklamis miajn poemojn dulingve (hispane-Esperante). Kiel kor-karese estis ricevi emociajn brakumojn el junaj gepoetoj, kiuj neniam antaŭe gustumis la belecon de nia internacia lingvo! Ili arde interesiĝis pri ĝi, pri ĝia socia mesaĝo kaj pri la ebloj ĝin trastudi por poemi Esperante... Nekredeble!... Kia feliĉo!

Nur ĉe la adiaŭo, du horojn post la komenco, eblis deklami sub la libera ĉielo. Kelkaj el ni ne fordormis la okazon.

Jen unu el la de mi deklamitaj poemoj, apartenanta al mia tria poemaro, *Rev-ene*, baldaŭ publikigota de Eldona Fakto de SAT:

MATENIĜO EN GRANDURBO

Matenruĝo sen ruĝo. Fulgo regas.
Akvo-hosoj batalas kontraŭ rubon.
Vane.

Super la plumoj de l' folioj arboj,
super la klorofilo de la birdoj,
super la pulmoj de la konsciencoj
venkis ombro kaj putro kaj poluo;
bruo
kaj vekhorloĝoj senkapaj, bit-animaj,
super la klarionoj de la kokoj.



Arteriojn trairas rapidaj trajnoj da
formikoj kunpremitaj sed tute izolitaj
unuj de la aliaj per kap-aŭdilaj muroj
kaj per etaj ekranoj kaj klavaroj,
kien kunfluas kompulsie ĉiuj
rigardoj, tuŝoj, revoj, emoj...

Ĉiuj!

Formikoj, kiuj perdis la kapablon paroli,
la kapablon percepti apudan proksimulon,
la kapablon komponi aŭrorojn kaj morgaŭojn,
perbarikadi lumojn kaj tempojn de ĉerizoj,
transformi la katenojn en ĉenojn de brakumoj,
soleni ĉiutage la ĝojon esti vivaj,
la ĝojon kisi, ami, spiri, flugi.

Malfermiĝas la pordoj.

Formikoj hastas kolone tersurfacen,
eliĝas el la truoj al la vendo-
postenoj.

Surbenke kaj surtere, surkartone
kaj sub ĉielo nigre mallibera
kaj oksigenomanka
– jen la tuta havaĵo –
eksformikoj provadas sensukcese
dormi dormon acidan kaj glacian.

Matenruĝo sen ruĝo. Fulgo regas
grandurbe.

Mateniĝas.

Miguel Fernández



VI. PRI LA AĴOJ EN LA LUNA ĜARDENO, KIE PRESKAŬ ĈIO ESTIS KVAZAŬ ARĜENTO

La ĝardeno de la domo havis du partojn: sunan kaj lunan. La unua estis antaŭ la fasado, en la sudo. La alia, en la orienta flanko, kie estis la fenestreto de Alfanhuí. Alfanhuí multe pli ŝatis tiun lunan ĉar lia haŭto blankis kiel ĝia lumo. En lunaj noktoj li sidis ĉe la lintelo de la fenestro kaj li rigardadis la ĝardenon.

En la ĝardeno staris kaŝtanujo kaj arĝenteca olivarbo, kun muskoleca trunko en kiu loĝis du blankaj ronguloj lum-okulaj, kiuj ĉiam ludadis kaŝ-ludon kiel sciuroj. Nokte videblis iliaj okuletoj, kiuj aperis kaj malaperis. Ili similis al urbaj lum-reklamiloj: komence unu lumeto; poste du, tri, kvar. Tri, du, unu kaj jen tiu for. Poste la kvar lumetoj samtempe, en alia parto de la olivarbo. Kaj tiele la tutan nokton, sen ke io aŭdeblis. Alfanhuí kutime restis kontemplantante la ĝardenon kaj la ludon de la ronguloj ĝis la luna foriro.

En la ĝardeno staris ankaŭ blanka limŝtono kun ringego kaj nigra ĉeno kiu treniĝis surgrunde. Meze troviĝis ronda baseneto kun ŝpruco, kies akva vergeto supreniris kaj agitiĝis nur en noktoj de ŝtormoj varmaj kaj sekaj, kaj mortigis libelojn kaj insektojn alblovatajn de la vento el riveroj kaj lagoj sekigitaj de la vento mem. Kaj kiam agitiĝis la surfaco de la baseneto, en malgrandaj ondetoj, sin montris la brilo de la arĝentaj sableroj kiuj kuŝis funde. Estis ankaŭ la servistino, enterigita en angulo de tiu ĝardeno. Fone staris alta muro kaj florforcejo, kiu estis ne plu vartata, kun polvoplenaj vitroj. Ene de la forcejo naskiĝis herbaĉoj kaj tie loĝis arĝenta kolubro kiu eliris lunbaniĝi en maldensejo de la ĝardeno. Al Alfanhuí multe plaĉis tiu kolubro kaj li deziregis kapti ĝin.


Alfanhuí sciis ke arĝento kaj oro estas du geedzaĵoj, kiel oranĝoj kaj citronoj, kaj venis en lian menson la ideo pretigi tri orajn ringetojn, nur iom pli larĝaj ol la ventro de la kolubro. Li ligis al ĉiu ringeto po unu longan ŝnureton kaj li atendis la plenlunon.

NOTO

Pasintnumere, oni publikigis la sepan parton de ci rakonto anstataŭ la sesan, sed la leganto povas konstati ke la afero ne estas tro grava, car temas pri apartaj rakontetoj. La Redakcio senkulpigas kaj deziras amuzan legadon.

Unu tagon, krepuske, li lokigis la ringetojn jene: la unuan, ĉe la truo tra kiu la kolubro kutime eliris; la duan, iom pli antaŭe, kaj la trian, meze de la maldensejo, kie la serpento kutimis lunbaniĝi. Alfanhú gbatis silente apud sia fenestro, kun la tri ŝnuretoj mane, el la interno de sia ĉambro, kaj li atendis. Leviĝis el la horizonto granda ruĝa luno kiu blankiĝis laŭ sia supreniro. Alfanhú restis senmova. Kiam la luno komplete estis jam blankiĝinta, la kolubro ekmontris sian kapon kaj eniris la unuan ringon. Poste ĝi tute eliris el la truo iom post iom, rigardante ĉien ajn, levante sian kapeton kaj fajfante per sia dupinta lango. Alfanhú plurestis senmove. Dekomence ĝi glitis en la ringeton kaj ne movis ĝin, sed kiam ĝi faris la unuan kurbon kiel litero so per sia korpo, ĝi kunportis la ringon alkroĉitan meze de sia ventro. Alfanhú eĉ ne spiris. En la venonta kurbo la serpento trapikis la duan ringon kaj trenis ĝin kun si, same kiel la unuan. Ĝi eniris finfine la trian ringon. Alfanhú rigardis senmove kaj plutenis la tri fadenojn, el la fenestro. La kolubro haltiĝis, kaj la tri ringetoj, treditaj per ĝia korpo, kuniĝis meze de ĝia ventro. Kuniĝinte, ili alproksimiĝis kaj premis ĝin, kvazaŭ brakume, ĉe la talio, kaj la kolubro estis kaptita. Alfanhú tiris lante el la tri ŝnuretoj kaj trenis ĝin ĝis la fenestro. La arĝenta kolubro endormiĝis volupte, pro la brakumo de la tri oraj ringetoj. Alfanhú rondigis ĝin en rondan skatolon el vitro, sen depreni el ĝi la tri ringetojn, kaj la kolubro restis letargia, rigida kaj brila kiel vere metala arĝento. Ĝi havis la korpon tute el malgrandetaj skvamoj, kiuj sonis kiam Alfanhú kuspis ĝin per ungue:

«Drinn...! Drinn...!»



Alfanhú malligis la tri silkajn fadenojn kaj fermis la vitran skatolon. La luno, kiu estis eniranta tra la duonaperta fenestreto, lumetis sur la vizaĝon de Alfanhú. Tiu rigardis la arĝentan kolubron sur siaj manoj kaj ridetis. Poste li gardis la skatolon en malhelo kaj enlitiĝis.

Kani

ORGANIZAS



FEDERACIÓN
ESPAÑOLA
DE ESPERANTO
MIKUMA ESPERANTO-FEDERACIO



ilei

KUNLABORAS



ESPERANTO KAJ EDUKADO
MADRIDO 2018

LA KULTURA HEREDAJO DE ESPERANTO



77a Hispana Kongreso de Esperanto

20a - 22a de julio

51a Kongreso de ILEI

21a - 28a de julio